



TRIMONATA, KULTURA KAJ MOVADA REVUO

LAMPIRO

48-a jaro n-ro 119 2007

Vino vekas
veron

Aplikado de
Esperanto en
Religioj kaj
Filozofioj



La alkemio de
Literaturo



LA LAMPIRO

48-A JARO N-RO 119 2007

Oficiala Organo de EASP
(Esperanto-Asocio de San-Paŭlo)

Trimonata, kultura kaj informa publikigaĵo,
senpaga por membroj de EASP

ĈEFREDAKTORO:

Genildo Martins Coelho
genildomcoelho@uol.com.br
Tel. (11) 6091-6420

REVIZIANTOJ:

José Dias Pinto, Eurico Ribeiro

KOMPOSTADO:

Joseo Tenorjo

REDAKCIO:

Rua Faustolo, 124
05041-000 - São Paulo - SP
Retpoŝto: lalampiro@easp.org.br

ABONU "LA LAMPIRO"-N!

Brazila abontarifo por 2007: R\$ 30,00
Unuopa ekzemplero: R\$ 10,00

La Redakcio ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj

EASP

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

www.easp.org.br

PROPRa SIDEJO:

Rua Faustolo, 124 - Lapa
05041-000 São Paulo - SP - Brazilo
Telefona-fakso: +55 (0 xx11) 3862-1183
Retadreso: contato@easp.org.br

ESTRARO:

Prezidanto: Genildo Martins Coelho
Vic-Prezidanto: José Roberto Tenório
1a Sekretario: Aparecida de Lurdes de Lucas
2a Sekretario: Marcos Zlów Zlotovich
1a Kasisto: José Martins Coelho
2a Kasisto: Joel Afonso Francisco
Propaganda Direktoro: vakas

KONSILANTAJ MEMBROJ:

Maria Pozder Almada
Margarida Antônia de Jesus
Paula Cristina Medve Zulques

Anstataŭantoj:

D-roj Floriano Pessoa Filho/Paulo Sergio Viana

ALIĜU AL EASP!

Membro-kategorioj (monate):

Kat. 1 (Simpla membro)..... R\$ 10,00
Kat. 2 (Kunlaboranta Membro)..... R\$ 12,00
Kat. 3 (Helpanta Membro)..... R\$ 17,00
Kat. 4 (Subtenanta Membro)..... R\$ 22,00
Kat. 5 (Nur por ŝtatintermanoj)* .. R\$ 5,00/3,00
Kat. 6 (Aliĝinta Asocio)..... R\$ 20,00 jare

• Jara antaŭpago (R\$ 102): 15% rabate
• Sesmonata antaŭpago (R\$ 108): .. 10% rabate

*Por ĉiuj, kiuj ne loĝas en la regiono "Granda San-Paŭlo"

DEĴORADO KAJ BIBLIOTEKO "GILBERT KAJ SYMILDE LEDON":
De lundo ĝis sabato, de la 15-a ĝis la 18-a horo.

Enhavo _____

ARTIKOLOJ:

- **Pri Elvira Fontes**
(JOSÉ DIAS PINTO) 3
- **Paŝanta rideto**
(JAMES RESENDE PITON) 3
- **Elvira Fontes - nekrologo**
(JOSÉ MARTINS COELHO) 4
- **Transformiĝo** - HELOISA SEIXAS
(TRAD. ALÓISIO SSARTORATO) 5
- **La misio de instruistino** - DOM JOSÉ
GASPAR (TRAD. FERNANDO J.C. MARINHO) 6
- **La alkemio de literaturo: Paulo ...
Coelho en Esperanto**
(PAULO SÉRGIO VIANA) 7
- **Rezolucio de la 92-a UK**
(GAZETARO DE UEA) 10
- **Vino vekas veron**
(FLORIANO PESSOA) 19
- **Aplikado de Esperanto en Religioj
kaj filozofioj**
(VICENT P. WERNECK) 22
- **Unua libro verkita en Esperanto ...
en Brazilo 70-jariĝas**
(FABIANO HENRIQUE) 25

POEMOJ:

- **Laban' ricevis Jakob'** - LUIZ V. CAMÕES
(TRAD. SYLLA CHAVES) 8
- **Animo dolĉa mia** - LUIZ V. CAMÕES
(TRAD. SYLLA CHAVES) 8
- **El la Esperanta Literaturo**
(LAJOS TÁRKONY) 9
- **La vivo ĉirkaŭe**
(JORGE DAS NEVES) 26
- **Viktimo de la amo**
(MANOEL BORGES DOS SANTOS) 26

KAJERO "MOVIMENTO"

(EN LA PORTUGALA) 11-18

KOVRILFOTO: La brazila verkisto Paulo Coelho

Pri Elvira Fontes

Paŝanta rideto

José Dias Pinto
Santo André/SP

James Rezende Pítton
UEA-Ĉefdelegito por Brazilo
Campinas-SP

Mi ne scias ĉu ŝi mortis serene, sed certe serene kaj serenige ŝi vivis.

Palbruna, malalta kaj maldika, ŝi tute ne estis impona figuro. Spontane natura neparademo kongruis kun la fizika aspekto kaj kontribuis al tio, ke ŝi ne lasis en alies memoroj multe da spuroj de la unuaj renkontiĝoj.

Almenaŭ tiel estis koncerne min. Mi certe ekkonis ŝin en la komenco de ŝia poresperanta laborado, kiun ŝi komencis, mi kredas, tuj post sia interesiĝo pri la lingvo, sed mi tute ne memoras pri la cirkonstancoj. Dum ŝia pli ol kvardekjara agado mi malmulte kunvivis kun ŝi, sed iom post iom konstatis, ke, malantaŭ tiu modesta eksterajo, estas homo kapabla vikle labori kaj persiste sin dediĉi al taskoj ne ĉiam plezurdonaj, kiel, ekzemple, pacience instrui pigrajn kaj lingve ne talentajn lernantojn.

Ne estas inter ni multaj homoj kiujn oni unuanime opinias -- sen sedoj, sen tamenoj -- estimindaj. Ne nur pro la granda nombro da esperantistoj kiujn ŝi akuŝe enesperantujigis. Per rekta instruado, per stimulado, per la asistado al aliaj instruistoj, per la prilaborado de lernolibroj. Pri ŝi estis certe unuanimeco inter la esperantistoj, ke ŝi, eĉ okaze de persista defendo de ideoj ne de ĉiuj aprezataj, kaptis kaj tenis estimon, simpation. Anstataŭ altrudo, rideto. Ĉi tiu pli efika ol la alia. Tiaj ridetoj kiuj, kvazaŭ retorika rimedo, vene de timiduloj, laŭcirkonstancas agas persvade aŭ pardonige, iel mildige al vortoj kaj sintenoj, ĉiam serenige.

Al la honorigaj distingoj de UEA kaj EASP, dumvive ricevataj, ni aldonu nian postmortan omaĝon.



Kiam mi unuafoje renkontis s-inon Elvira, mi estis esperantisto de nur du jaroj. Ni estis en Salvador, por mia unua Brazila Kongreso de Esperanto, en 1990. Mi submetiĝis al ekzameno pri la baza, gvidata de ŝi. Tuj impresis al mi tiu respektinda sinjorino, fizike simila al miaj praonklorinoj, kiu preskaŭ ĉiun

frazon, eĉ admonojn kaj rekomendojn, prononcis kun rideto. Nur iom poste mi malkovris, ke tiu malgrandulino fakte reprezentis giganton en la moderna historio de Esperanto en Brazilo. Kaj tiun memorindan rideton mi revidis en kelkaj aliaj okazoj, bedaŭrinde ne tiom ofte dum ŝiaj lastaj vivojaroj, kiujn kronis la Honora Membreco de UEA.



Karaj Samideanoj,

Kvankam hodiaŭ mi estas en Tokio, miaj pensoj, koro kaj preĝoj kuniĝas kun ĉiuj vi, por adiaŭi (nian) tre estimatan Elvirinha, kiun feliĉe mi vizitis du tagojn antaŭ ekvojaĝi, kaj mi kunportis al ŝi sian mansakon de aliĝinto al BKE/RJ. Ankaŭ nun, mi kunportas ŝian mansakon, kun Kongresa libro, de aliĝinto al UK/2007, kiun mi intencis transdoni al ŝi, tuj poste mia alveno al Brazilo.

Certe ŝi survojas al Esperantujo, en Supera Mondo.

Kore,
Aparecida Araujo,
El Japanio



Elvira Fontes (1916-2007)

José Martins Coelho
Unua Kasisto de EASP

NEKROLOGO

Emerita instruistino, Elvira Fontes naskiĝis en Bauru-SP (Brazilo), la 21an de Julio 1916 kaj mortis en São Paulo-SP (Brazilo), la 25an de Aŭgusto 2007. Ŝi esperantistiĝis en 1960 kaj de tiu tempo ĝis 2002 (kiam ŝi, pro sanaj problemoj, ĉesigis sian agadon ĉe nia asocio) laboris ĉiutage por Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), do ŝi konsumis siajn plej bonajn vivjarojn laborante ne nur por EASP, sed por la brazila kaj internacia esperanto-movado.

Ŝi debutis en la estraro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo en la periodo 1970-1971, en la posteno de kasisto. En la periodo 1972-1973 ŝi okupis la postenon de 2-a Sekretario.

Maldika, malalta, sed plena de talento kaj energio, de 1974 ĝis 1983, ŝi brile okupis la prezidantecon de EASP kaj fariĝis respondeculino por la instruado, kursoj kaj organizado de esperantaj eventoj.

Ŝi multe helpis la diskonigon de Esperanto per gazetoj, radio kaj televido.

De 1973 ĝis 1979 ŝi redaktis la revuon LA LAMPIRO

Ŝi estis membro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj ties reprezentanto ĝis 2002 kaj dum multaj jaroj okaze de Brazilaj kongresoj de Esperanto, ŝi multe helpis BRAZILA-n ESPERANTO-LIGO-n (BEL) zorgante pri esperantaj ekzamenoj.

Kiam ŝi reprezentis ILEI, ŝi redaktis kaj reviziis, dum kvar jaroj, la revueton MILDE.

Verkistino, ŝi verkis kaj eldonis du lernolibrojn: Unuaj Paŝoj (7a eldono 2001) kaj Survoje al Esperantujo (2a eldono 2000), kiuj ankoraŭ estas multe uzataj en esperantaj kursoj.

Ŝi estis membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), VD de tiu asocio dum pli ol 30 jaroj kaj ankaŭ FD dum sia tuta esperanta vivo. Ŝi ankaŭ estis honora membro de UEA, BEL kaj EASP.

Ŝia malapero malriĉigas la esperantan scenejon.

Nome de EASP kaj ties membraro, ni prezentas al ŝiaj gefamilianoj niajn plej sincerajn kondolencojn.



Krom sinonimo de bonkoreco kaj simpatio, Elvirinjo estis sinonimo ankaŭ de klereco kaj pacienco. Mi rememoras ŝin kiel paŝantan vortaron. Kiam, dum babilado aŭ legado, al ni mankis iu vorto, anstataŭ konsulti vortaron, ni pigreme turnadis nin al ŝi. Plej ofte ŝi rapide elturniĝis antaŭ niaj gapantaj okuloj. Foje, la solvo ne venis tuj, sed meze de iu leciono. Tiam ŝi petis permeson al la gelernantoj, aliris la vorto-demandinton por flustri al li la eltrovon, kaj plej diskrete revenis al sia leciono. Alifoje, kiam la bezonata esprimo postulis ne mensan tralegadon de kelkcentoj da malnovaj paĝoj, sed vortokreemon cele forĝi la novan esprimon, ŝi promesis esplori la temon hejme. Post du-tri tagoj, kiam la demandinto eĉ forgesis pri la afero, ŝi telefonis meze en la nokto por regali lin per la vorteltrovo. Tia estis Elvirinjo.

Joseo Tenorjo

Transformiĝo

Heloisa Seixas



Tradukis:
Aloisio Sartorato
Rio de Janeiro-RJ

Eble mi sonĝis, pensis la virino. Aŭ estis iu sonĝo ene de iu sonĝo, ene de alia sonĝo. Sed eble ne.

Ŝi denove paŝis ĝis la fenestro kaj rigardis la senhoman straton tie malsupre. Sur la fronta trotuaro, iu almuzulo dormadis sur tirĉareto, plene rondkuŝiĝinta, meze de paperstakoj kaj rubaĵsakoj. Li mem aspektis kiel rubaĵsako, io nehoma. Sed li ja estis homa. Por ŝi, por la virino, li estis nedubinde pli homa ol tio, kio minacas ŝin. Vere la dormanta almuzulo, la parkitaj aŭtoj, la kvieteco de la strato mem, ĉio transdonis al ŝi iun senton de normaleco, preskaŭ de sekureco. Eble ŝi devus elhejmiĝi. Alfronti la nokton tutsole. Eble estus pli sekure.

Ŝi turnis sin kaj rigardis la malplenan vivĉambron, kiu estis malantaŭ ŝia dorso, la bluecan duonlumon, kiu devenis de la komputila ekrano. Kaj demandis al si mem kiamaniere ŝi pasigos la mankantajn horojn ĝis la mateniĝo. Sed multe pli ol tio, kiamaniere ŝi sukcesos distingi kio estas kaj kio ne estas reala – resti sana.

Kaj ĉefe ne cedi al la emo relegi tion, kion ŝi skribis.

Kiam ŝi komencis verki la terur-rakonton, ŝi ne antaŭsupozis tion. Ŝi jam estis farinta similajn aferojn plurfoje. Kaj kiam ŝi verkis, ŝi ne timis, samkiel okazis pasintece. Sed

ĉifoje la rakonto temis pri iu verkisto. Verkisto kies temoj estis terur-rakontoj. Kaj kiu iam vidis la materiigon de la personoj de siaj rakontoj. Eble tie kuŝis la diferenco.

Streĉe tordante la manojn, ŝi alproksimiĝis al la komputilo. Tre proksime al la ekrano ŝi glitigis la fingrojn sur la klavaron. Ŝi ne sidiĝis.

Ŝi tuŝis la muson kaj kondukis la montrilon ĝis malgrandan dosierujon kaj, ankoraŭ stare, malfermis la dosieron. Aŭtomate, preskaŭ neperceptante kion ŝi estas faranta, ŝi plian fojon rekomencis la legadon. Kaj, kiel antaŭe, okazis denove la nekonscia transformiĝo.

Probable ŝi estis ferminta la okulojn dum ero de sekundo kaj, malferminte ilin denove, ŝi ne plu estis la sama persono, ŝi ne plu staris en la vivĉambro, meze de la nokto. Ŝi piediris surstrate – iu nekonata strato, kiu ne apartenis al ŝia mondo. Kaj ŝi plene estis konscia pri iu terura danĝero – supernatura, nekontrolebla, kiu atendadis ŝin. Ŝi malvarme ŝvitis, glaciigis ŝiaj fingro-pintoj. Kaj mallevente la okulojn, ŝi rigardis la proprajn manojn.

Kaj ili estis viraj manoj. Aliulaj manoj. Kaj en tiu momento ŝi estis tutcerta, ke ŝi estas travivanta la rakonton, kiun ŝi verkis.

Tute nevole, ŝi estis trapasinta la limon.



La misio de instruistino

Dom José Gaspar



Tradukis:
Fernando J.G. Marinho
Rio de Janeiro-RJ

El ĉiuj artoj, instruado estas, sendube, unu el la plej admirindaj. Ĝi floris dum tiuj gravaj jarcentoj de Mezepoko, kiam koncernis la monaĥojn la glora tasko kopii kodeksojn.

Tuj post la kanonikaj horoj, la monaĥoj dividis sin en du grupojn. Kelkaj foriradis al la kampoj, kaj aliaj al la “scriptorium” (skribejo), ĉar la klostra leĝaro ne akceptis aliajn alternativojn: plugilo aŭ plumo. “Pagingam pingat digito que terram non proscindit arato”.

(“Kiel skribado ne povas malhavi literon, tiel la grundo ne povas malhavi plugilon”)

La “scriptorium” estis vasta volba ĉambro kun longaj kaj ĉarmaj ogivoj, kiuj daŭre sorbadis la balzaman aeron fontantan el la mona eja arbaro

Tie la religiuloj, apartigitaj laŭ du klasoj, silente laboradis por la estonteco.

Koncernis la kodekso-skribistojn, aŭ kopiistojn, la metio transkribi la malnovajn kodeksojn, ĉiam lasante blankan spacon por la ĉeflitero de ĉiu ĉapitro, ĉar koncernis la miniaturistojn desegni kaj ornami tiun literon.

Kian mirandan laboron faris la monaĥa artisto! Klinita super la desegnotablo, dum pluraj horoj, senĉese rigardanta la pergamenon, li laboris por desegni, sur tre malgranda spaco responda al la limoj de una sola litero, sian grandan inspiron.

Li akcentis tonojn, faris konturojn, alĝustigis liniojn, kaj je la fino, tiu litero ja sinprezentis kiel arta juvelo.

Sur malgranda spaco li pentris pejzaĝon, personon, historian scenon, preskaŭ ĉiam la resumon de la tuta ĉapitro kopiita de kodeksoskribisto.

Estimataj Instruistinoj!

Via laboro devas esti kia tiu de miniaturistoj.

La infano, kiun oni konfidis al vi, laŭ aĝo kaj animo, estas kvazaŭ litero, la ĉeflitero de tiu granda blanka kodekso skribota, nome, la vivo de homo.

Ĝuste tie, sur tiu malgranda homa litero, faru la laboron de artisto, ne de salajrocelaj uloj.

Desegnu, sur tiu senpeka koro, belegan bildon, kun ĉiuj nepraj linioj, kiuj forĝas noblulojn, kaj kun ĉiuj koloroj de la kristanaj sentoj, kiuj

karaktizas la grandajn animojn.

Faru, ke la infanoj estiĝu malgrandaj homoj por ke, kiam ili fariĝos homoj, ne estiĝu infanoj grandaj.



(Al tiuj, kiuj ŝatas bildoseriajn dosierojn ni rekomendas malfermi la paĝon <http://www.npoint.com.br/semteira/lamisiodeinstruistino.pps> kaj surklaki la butonon “somete leitura”)



La alkemio de literaturo: Paulo Coelho en Esperanto



Paulo Sérgio Viana
Lorena/SP

Paulo Coelho estas polemika aŭtoro. Homoj amas liajn librojn, homoj ignoras – aŭ eĉ malamas – ilin. La aŭtoro mem sin alnomis “sorĉisto” (aŭ “magiisto”?), ekde sia alia verko “Taglibro de Sorĉisto”. Oni akuzas, ke li agas kiel ruza propagandisto, kiu manipulas publikan opinion per trompoj kaj ŝajnigoj. Ĉu la publika opinio estas tiel naive stulta? Lujn faktojn ne eblas malakcepti: li magie atingas milionojn da legantoj en la tuta mondo, kontraktas milionule kun siaj eldonistoj, lanĉas librojn en Irano, frekventas la poŝon de usona eksprezidanto, aperas en amaskomunikiloj, elektiĝis en la Brazila Beletra Akademio, kaj baldaŭ verko lia transformiĝos en kinfilmon. Ĉu ne efektivaj mirakloj?

Ni tamen flankenlasu gradiozajn statistikojn kaj spektaklajn sukcesojn kaj provu rigardi la literaturon de Paulo Coelho tia, kia ĝi simple estas: literaturo. Persone, mi spertis kuriozan hazardon, kiam mi komencis legi mian unuan libron de Paulo Coelho, “La Alkemiiston”, en Esperanta versio. Ĝi estis lanĉita en la jubilea 42-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Rio, en julio 2007. La tradukinto, S-ro Carlos Valle, simpatie kaj modeste prezentis la libron, kun la interesa informo, ke la aŭtoro volonte rezignis pri aŭtorrajtoj, favore al Esperanta eldono. Scivolemo tiklis min. Fine mi legos verkon de tiu fama brazilano. Mi do dum kelkaj tagoj interrompis la longan legadon de “La Dia Komedio” de Dante Alighieri, kaj ekplonĝis en “La Alkemiiston”, de Paulo Coelho. La kontrasto estis ŝoka! Kaj el tia ŝoka kontrasto aperis al mi kurioza, subtila kompreno pri la vera signifo de literaturo

– tiu bonfara pluvo, kiu falas sur justulojn kaj maljustulojn, sur virtulojn kaj malvirtulojn, sur simplulojn kaj geniulojn. Mi iom pli bone ekkomprenis la valoron de literaturo (kaj de ĉia arto, ĝenerale): prilumi la spiritojn, de la plej infanaj ĝis la plej maturaj.

Ĉu oni povus diri, ke Dante estas pli bona ol Paulo Coelho? Mi asertas, ke ne! Pri literaturo (kaj arto) oni devus simple diri, kiel oni diras pri vinoj: plej bona vino estas tiu, kiun oni trinkas kun plej granda plezuro. Ne ekzistas tia pesilo, kiu taŭgus por mezuri la konsiston de literaturaĵo. Ĝi koncernas sentojn kaj pensojn, en si mem sensubstancajn, nome la plej valoran parton de ni mem.

Kion diri pri “La Alkemiisto”? Unue, ke la legado kaŭzas miron. Ne pro la enhavo mem de la verko, sed pro la granda furoro, kiun ĝi kaŭzis. Ĉar ĝi estas simpla, senpretenda kaj senornama rakonto pri junulo, kiu serĉas ian vivsencon, ian saĝon, ian internan prilumiĝon. Nenio tre speciala aŭ tre originala. Oni

tamen legas paĝon post paŝo facile kaj eĉ agrable – en la senco, ke la ideoj ne postulas fortajn penojn kaj ne aperas malglataj aŭ lamaj. Nenio malbongusta, sed ankaŭ nenio franda. Al mistikemaj legantoj certe la ideoj pli plaĉas, ĉar la tutan rakonton insiste trapasas abstraktaj konceptoj pri “animo de la mondo”, “serĉo de persona legendo”, “ĉio estas unu sola afero”, “la lingvo de la mondo”, kaj similaj. Temas do pri mistertona serĉado al saĝo. Al malmistikemuloj kaj al pli postulemaj, filozofiemaj legantoj la verko eble malplaĉas, ĉar ĝia “mesaĝo” kuŝas iom malprofunda kaj senkonsista.



Sed oni klare rimarkas, ke la aŭtoro ne intencis verki filozofian traktaĵon, sed nur rakonti historion kun mistika fono. Simpla rakonto, plena je simboloj. Kaj oni nepre kalkulu inter la meritoj la ĉefan intencon de la verko: ekzalti amon kaj la neceson, ke homoj kontaktu sian plej internan memon por atingi pli riĉan psikan vivon. Kiu povus kontraŭi tiajn universalajn valorojn?

Kio pri la traduko? La Esperanta versio estas klara kaj facile legebla: neniu frazo aperis al mi konfuza aŭ dubsenca. Ĉi tio estas ja merito. Oni tamen rimarkas la influon de la portugala lingvo: “fari parton” (anstataŭ partopreni), “oferi” (anstataŭ proponi), “peti al” (anstataŭ peti de), “projekti” (anstataŭ plani), “konfidi” (anstataŭ fidi), “fari amikecon” (anstataŭ amikiĝi), “licenco” (anstataŭ permeso), “havi timon” (anstataŭ timi). Iom nekutimaj esprimoj ripetigās: “post iom”, “post tiam”, “en serĉo de”. Kaj etaj gramatikaj stumbletoj enŝteliĝis. (Tial oni ĉiam klopodu, ke ankaŭ alilingva revizianto tralegu la tradukon, por garantio de internacieco.) Sed mi emfaze ripetas: la legado fluas klare kaj plaĉe. Oni povos facile elsarki malglataĵojn el dua eldono, ĉar espereble la Esperanta publiko rapide elĉerpos la unuan. Belan laboron faris la tradukinto, disponigante en nia lingvo “La Alkemiiston”. Ĝi montras, ke la Esperanta kulturo konektiĝas kun la tutmonda inklino kaj liveras al ni la eblecon konatiĝi kun fama verko, kiu atingis “magian” sukceson.

(aŭguston, 2007)



Sylla Chaves
Rio de Janeiro-RJ

LABAN' RICEVIS DE JAKOB'

Luiz Vaz de Camões
Tradukis Sylla Chaves

Laban' ricevis de Jakob', pro l' belo de la filin', sep ĵarojn da labor'; laboris tiu ĉi por ŝi, ne por la patro... nur ŝi estis lia celo.

Revante ĉiun tagon pri la helo de unu tag', li havis en memor' nur ŝin... sed lia rev' perdiĝis for: premio estis Lio, ne Raĥelo.

Vidante la paŝtisto kompatinda, ke pro la ruz' sen l' amatin' li restus, kvazaŭ li ŝin ne estus meritinta,

ekservis pli sep ĵarojn, sen bedaŭro, dirante: “Mi plu servus, se ne estus, por granda amo, eta l' vivodaŭro.”

.....

ANIMO DOLĈA MIA

Luiz Vaz de Camões
Tradukis Sylla Chaves

Animo dolĉa mia, forfluginta tro frue de ĉi tiu viv' sen cel', ripozu vi por ĉiam en ĉiel', dum mi sur tero restas, bedaŭrinda.

Se en ĉielo estas akceptinda memoro pri ĉi tiu viv-malhel', vi ne forgesu pri la puro de l' amflamoj, kiujn estis vi vidinta.

Se mi meritas, ke vi provu plue balzami ĉi solecon, tiun ĉi doloron senkuracan, vi unue

petegu al burĝon-falĉinta Di', ke li min sendu por vin vidi frue, samkiel frue prenis vin de mi.

El la Esperanta Literaturo



TÁRKONY, Lajos (TOTSCHÉ, Ludoviko). 1902-1978. Hungaro; ŝtatoficisto en la financa ministerio. Naskiĝis en Budapeŝto. Esperantistiĝis en 1919; samjare aperis lia unua noveltraduko en "Hungara Esperantisto". Gvidis kursojn. Publikigis poemojn kaj recenzojn en "Literatura Mondo". Kunredaktoro de "Literatura Mondo", "Bibliografia gazeto" kaj "Lingvo-Libro". Konata recenzinto. Poemoj en Dekdu poetoj (1934).

"En 'De paĝo al paĝo' li kritike pristudis niajn ĉefajn verkistojn postmilitajn. Liaj kriterioj rifuzis la legolibran tradicion de niaj recenzistoj, kies kritikado estis plie lingva ol literatura. Jam estas tempo taksu serioze la verajn valorojn de nia literaturo, kaj la kritiko mem estu literatura formo: tia estis lia principa sinteno, kaj ĝi enhavis ankaŭ lian pretendon, ke nia literaturo jam liveras taŭgan materialon por kultureca kritiko." W.B. Johnson, Enciklopedio de Esperanto, 1934, p. 541-542

Aliaj verkoj:

De paĝo al paĝo (originalaj studoj pri la esperanta literaturo, 1932)

Hungara antologio (kontribuinto, 1933)

Karinthy: Vojaĝo en Faremidon (tradukitaj noveloj, 1934)

Soifo (originala poemaro, 1964).

Liaj verkoj publikigitaj antaŭ la Dua Mondmilito aperis sub la nomo Ludoviko Totsche. / William Auld en Esperanta Antologio, 1984. / Enciklopedio de Esperanto, 1934, p. 541.

Triopa trista gard'

de Ludoviko TOTSCHÉ

en Dekdu poetoj, paŝoj 116-117

Okupas ĉambron la vesper'

En marŝo mola,

Envolvas ĉion sorĉa ret':

Silent' viola.

Al antipod' jam kuras la

Purpura sun-kales',

Mallaŭte zumas vent-vagul'

Tra la krepuska freŝ'.

De fore ondas tra l' fenestro

Sonorila tint',

Sur mont' kontraŭa lampoj vibras

Serpente ĝis la pint'.

Dancigas ombrojn sur la muro

La stratlanterna bril',

Fendas la nigron de l' ĉielo

Arĝenta lun-falĉil'.

Silento, solo kaj vespero:

Triopa trista gard'.

Ve, vane serĉas ion, iun

Post montoj la rigard'.

La pensoj ĝermas, velkas,

Kaj dronas en la mut'

Kaj pasas la senhalta Temp' ...

Ĉu horoj? Ĉu minut'?

Jen, nokton krias ie la

Horloĝ' kukola,

Dolor' ekveas en la kor',

Ĉar sola.

Fonto: <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/dekdu/totsche/gard.html>

REZOLUCIO DE LA 92-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007 kun 1901 partoprenantoj el 57 landoj, kun la temo “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”,

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter “Okcidento” kaj “Oriento”, sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri “Okcidento” kaj “Oriento” malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la jaro 2008 estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Alvokas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.



STATISTIKO DE LA 92-a UK

Al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo aliĝis 1901 esperantistoj el 57 landoj. La dua UK en Japanio estis do pli multnombra ol la unua, kiu okazis en Tokio en 1965 kaj arigis 1710 aliĝintojn. En Jokohamo ĉeestis krome 160 personoj, kiuj aĉetis 196 unutagajn kartojn. La oficiala statistiko de UK-aliĝintoj, kiu aperas i.a. en la Jarlibro de UEA, tamen ne inkluzivas aĉetintojn de unutagaj karto.

Plej multe da kongresanoj, 1024, liveris la gastiganta lando Japanio. Minimume 10 aliĝintoj venis el Francio (94), Korea Respubliko (91), Germanio (62), Ĉinio (57), Litovio (49), Italio (46), Rusio (35), Pollando kaj Usono (po 34), Brazilo kaj Nederlando (po 32), Britio kaj Hispanio (po 24), Irano kaj Svedio (po 19), Finnlando, Kroatio kaj Svislando (po 18), Aŭstralio, Belgio kaj Bulgario (po 16), Ĉeĥio (12), Hungario kaj Israelo (po 11), kaj Slovakio kaj Vjetnamio (po 10).

Fonto: GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA N-ro 267 - 2007-08-23



Longe de casa, mas perto do coração dos amigos asiáticos

A esperantista e membro da Associação Paulista de Esperanto, Aparecida Araújo, viajou recentemente para o Continente Asiático, para participar de três grandes eventos esperantistas: um no Vietnã e dois no Japão.

Sua primeira parada foi em Hanói, no Vietnã, para participar do 63º Congresso Internacional dos Jovens Esperantistas (IJK).

De Hanói, sua próxima parada foi a cidade de Yokohama, no Japão, onde aconteceu o 92º Congresso Universal de Esperanto (UK) com a participação de 1710 esperantistas de 57 países.

Ainda no Japão, na cidade de Kameoka, ela participou de um evento, organizado pela Associação Religiosa Oomoto, que deu as boas vindas a alguns dos participantes do UK.

Do Japão, nossa amiga seguiu vôo para a milenar e misteriosa China, onde passou 40 dias em companhias de amigos esperantistas.

Todo esse itinerário com muita aventura, em terras com costumes e línguas tão diferentes, só foi possível graças ao contato direto com alguns esperantistas dos lugares por onde passou.

De volta ao Brasil, muitas novidades, fotos e lembranças na bagagem para dividir com os amigos que ficaram e que, após ouvirem os relatos de viagem, certamente se sentirão motivados a estudar mais profundamente o Esperanto.

Leia um pouco sobre essa aventura, nas páginas 17-19 deste suplemento.

ENCONTRO DE ESPERANTO NO VALE DO PARAIBA



Acorreu no dia 30 de setembro, na cidade turística de Caraguatatuba/SP, o 69º Encontro de Esperanto no Vale do Paraíba, com a participação de cerca de 50 pessoas. O evento aconteceu no auditório da Fundação Educacional e Cultural de Caraguatatuba (FUNDACC), situado na Rua Santa Cruz, 396 - Centro, Sob a organização do Dr. Maurício Monken, Diretor da Liga Brasileira de Esperanto (BEL), com a ajuda do grupo esperantista local. Após a leitura da ata do Encontro anterior, pelo samideano Milton Serra, os visitantes ouviram palestras sobre o hino brasileiro (Prof. Sylla Chaves), meditação (Dr. Elmir Lima), astrofísica (Prof. Genildo Coelho), OVNI-s (Luiz Alberto Coelho) e sobre a viagem do adido da Organização Brasileira dos Jovens Esperantistas (Lucas Vignoli). Além disso, foi prestada uma homenagem à importante esperantista Elvira Fontes, recentemente falecida. Em seguida, o Presidente da Liga Brasileira de Esperanto, Prof. Passini, falou aos presentes sobre os trabalhos da Organização. Também prestou informações ao público o diretor interino da Seção Brasileira da Liga Internacional dos Professores Esperantistas, José Roberto Tenório, que na ocasião apresentou o quarto número da revista *Brazilei*, destinadas aos instrutores de Esperanto. Quanto à parte artística, números de canto, rap e a orquestra de jovens violonistas de Caraguatatuba fecharam o evento sob os colorosos aplausos dos participantes.



Luiz Vaz de Camões
(1524 - 1580)

SETE ANOS DE PASTOR Original de Luiz de Camões

Sete anos de pastor Jacob servia
Labão, pai de Raquel, serrana bela;
mas não servia ao pai, servia a ela,
que a ela só por prêmio pretendia.

Os dias, na esperança de um só dia,
passava, contentando-se com vê-la;
porém o pai, usando de cautela,
em lugar de Raquel lhe deu a Lia.

Vendo o triste pastor que com enganos
assim lhe era negada a sua pastora,
como se a não tivera merecida,

começou a servir outros sete anos,
dizendo: "Mais servira, se não fora
para tão grande amor tão curta a vida."

A tradução deste soneto para em
Esperanto encontra-se na pág. 8

Esperanto-br

de pli ol 7 jaroj informante pri
kio okazas enlande k eksterlande

<http://br.groups.yahoo.com/group/esperanto-br>

Querida Professora Elvira Fontes, Adeus!

Marcos Zlów



No dia 25 de agosto passado o Esperanto perdeu em nosso planeta a importante “paca batalantino” (“batalhadora da paz”) nossa querida e mestra Elvira Fontes (1916—2007). Tinha 91 anos de idade há pouco completados. Por profissão era professora de francês. Nunca casou-se nem teve filhos. Em nossa memória Elvira ficará eternamente como modelo de amor incondicional em particular à Associação Paulista de Esperanto (EASP) e, em geral, ao movimento esperantista brasileiro e, como um todo, ao Esperanto como encarnação de seus ideais generosos e fraternos que abraçam toda a humanidade.

Tendo se filiado à EASP em 24 de setembro de 1960, no mesmo ano que aprendera a língua e que já começara a ensiná-la, dedicou as demais décadas de vida sempre com fidelidade e dedicação exemplares a essa Associação, da qual se tornou um símbolo: quem pensava na EASP, pensava em “Dona Elvira” com seu sempre contagiante sorriso, simplicidade e otimismo.

Exímia professora celebrada de nossa língua, sempre amável e carinhosa com todos, foi também incansável organizadora, seja dos Encontros Estaduais de Esperanto, seja como autora e editora de livros, a exemplo do didático “Unuaj Pasxoĵ” (“Primeiros Passos”), que persiste entre os mais senão o mais usado em todo o movimento esperantista brasileiro, bem como Survoje al Esperantujo (“Rumo ao Mundo do Esperanto”), para cursos adiantados.

Elvira participou na nossa EASP em todos os níveis, da qual foi professora, durante 4 décadas, do curso básico ao pedagógico (tive o privilégio de formar-me professor de Esperanto através dela, de cujas mãos amorosas recebi meu diploma e a inspiração para perseverar como esperantista). Elvira também foi presidente da Associação durante cinco mandatos (dez anos), sempre tendo como vice-presidente o saudoso orador esperantista

Walter Francini (autor de “Esperanto Sem Preconceitos”, entre outros livros). Eram uma “dupla dinâmica”.

Na década de 1970 Elvira apresentou curso de Esperanto na televisão (pela TV Cultura) e colaborava na coluna semanal de Esperanto do jornal Diário Popular.

Um de seus “amores” foi a revista La Lampiro (“O Vagalume”), órgão oficial da EASP, tendo sido redatora durante muitos anos.

Tendo sido minha predecessora imediata na direção da ILEI-BR (Seção Brasileira da Liga Internacional dos Professores Esperantistas), de quem sempre recebi apoio e conselhos, organizava reuniões pedagógicas trimestrais da ILEI-BR e fundou e redigiu por quatro anos seu boletim Milde. Em nível nacional, cuidou das sessões examinatórias realizadas nos Congressos Brasileiros de Esperanto.

Elvira Fontes era membro honorário da Associação Paulista de Esperanto, da Liga Brasileira de Esperanto e da Associação Universal de Esperanto.

Como tradutora, os trabalhos que ocuparam seus anos finais de vida, foram as versões para o Esperanto (ainda não editadas) do Evangelho de Chico Xavier (de Carlos Baccelli) e de mais três livros de Sônia Café: O Livro das Atitudes e Meditando com os Anjos 1 e 2, sendo que, quanto a estes três últimos, Elvira fez esse trabalho maravilhoso a meu pedido para um projeto que desenvolvi, livros estes os quais, em honra a sua mais que querida, mais amada memória, temos compromisso de editar até o próximo ano.

Elvinjo, Elvirinha querida, onde quer que estejas desvendando outros mundos, recebe nossos carinhosos beijos e abraços e nossa eterna saudade!

Ĝis baldaŭ!

Zlów

ELEITA A NOVA DIRETORIA DA BEL

Durante o 42º Congresso Brasileiro de Esperanto foi eleita e empossada a nova diretoria da Liga Brasileira de Esperanto e que é a seguinte:

Presidente: ex-reitor José Passini
(Juiz de Fora-MG)

Vice-presidente: médico e tradutor
Paulo Sérgio Viana (Lorena-SP),

Primeiro secretário e chefe do Escritório Central: Carlos Maria
(Brasília-DF).

Segundo Secretário e principal responsável pela revista Brazila Esperantisto: Francisco Stefano Wechsler (Campinas-SP).

Terceiro secretário: Alfredo Aragón
(Rio de Janeiro-RJ).

Diretor Financeiro: João Osvaldo Pestana (Brasília-DF)

Tesoureiro: Maria das Dores Góis
(Brasília-DF)

Conselho Fiscal:

Aymoré Vaz Pinto (Brasília-DF)

Eurípedes Alves Barbosa (Brasília-DF)

Wilson Álvares de Oliveira (Brasília-DF)

Substitutos do Conselho Fiscal:

Aloísio Sartorato (Rio de Janeiro-RJ)

Célio Freitas Martins (Rio de Janeiro-RJ).

Maurício Monken Gomes
(Caraguatatuba-SP).

Fontes: Carlos Maria (Brasília-DF).
Sylla Chaves (Rio de Janeiro-RJ)

PROJETO ESPERANTISTA PROMETE ANIMAR O CARNAVAL 2008

A Liga Brasileira de Esperanto (BEL) pretende iniciar o Projeto BEL-Conferências. A proposta da nova diretoria da instituição é realizar uma série de palestras com temas e expositores criteriosamente selecionados. Segundo o idealizador do projeto, o médico Paulo Sérgio Viana, a iniciativa tem como objetivo aumentar o padrão cultural do esperantista brasileiro, bem como seu domínio do idioma. A primeira edição das conferências ocorrerá nos dias 3 e 4 de fevereiro de 2008, na cidade paulista de Lorena, contanto que haja ao menos 20 inscritos. Planeja-se publicar um livretinho com os textos das palestras para ser enviado a todos os associados da Liga Brasileira de Esperanto. Interessados podem inscrever-se pelo endereço psviana@terra.com.br.

Informou Fabiano Henrique



SANGUE NOVO NA ACADEMIA DE ESPERANTO

A Academia de Esperanto tem nova diretoria. A informação foi divulgada pelo site da entidade nesta

sexta-feira (14/09/2007). O professor inglês John Wells foi eleito presidente. O cargo de vice coube ao indiano Probal Dasgupta. A Academia de Esperanto foi criada em 1905, com o nome de Lingva Komitato. Sua função é acompanhar a natural evolução do idioma, procurando preservar seu fundamento.

Informou Fabiano Henrique

VALE DO PARAÍBA PERDE UM GRANDE DIVULGADOR DO ESPERANTO

Faleceu aos 96 anos, no dia 5 de outubro de 2007, na cidade de Caçapava/SP, o esperantista Gilberto Aquino da Silva Velho, mais conhecido como Major Silva Velho. Nasceu em Curitiba, em 5 de junho de 1911, e conheceu o Esperanto nos anos 60, na cidade de Jundiaí/SP. Participou de muitos eventos esperantistas em todo o País, organizou exposições sobre o idioma em várias cidades brasileiras e editou, durante 19 anos, o informativo bilingue “Esperanto Notícias”, cujo primeiro número apareceu em outubro de 1986. O informativo de cerca de 10 páginas tamanho ofício era enviado para muitos esperantistas e organizações, no Brasil e exterior, tudo custeado com recursos do próprio redator. Graças a este trabalho ímpar de compilação e redação, foi possível ao compilador da “História do Esperanto no Brasil”, o advogado e jornalista, Dr. Osvaldo Pires de Holanda, enriquecer a referida obra com informações importantes sobre o movimento esperantista brasileiro, que pode ser consultada no endereço <<http://historio.esperanto.org.br>>.



MATÉRIA SOBRE O ESPERANTO

A Revista Língua Portuguesa publicou matéria sobre o Esperanto

em sua edição de julho. O trabalho social desenvolvido na Fazenda Bona Espero, em Goiás, foi o tema da reportagem. Foram destinadas ao assunto seis páginas com diversas fotos e ilustrações. A Revista Língua Portuguesa está à venda nas bancas de jornal de todo o país. Na internet o texto pode ser lido no endereço www.revistalingua.com.br



CONGRESSO EM RIBEIRÃO ATRAI ESPERANTISTAS DE 35 CIDADES

Cerca de 160 esperantistas de 35 cidades brasileiras participaram do 2º Congresso Paulista de Esperanto, ocorrido na cidade de Ribeirão Preto, nos dias 12, 13 e 14 de outubro de 2007. A excelente organização do evento, pela Associação Pró-Esperanto de Ribeirão Preto (APERP), em parceria com a Associação Paulista de Esperanto (EASP), mais o clima de confraternização e o alto nível das palestras pontuaram com grande sucesso a edição deste importante evento para o movimento esperantista no Estado de São Paulo. Ao todo foram 15 palestras sobre vários temas, dois cursos expressos de Esperanto, excursão ao parque central, serviços de venda de livros e camisetas, apresentação do Coral Batuíra, além de números musicais e declamação. Ainda não foi decidido onde acontecerá a 3ª edição do evento.



Impressões de Viagem

Aparecida de Souza Araújo

Japão

Aqui no Japão, onde estou desde o dia 04 de agosto, tive muita dificuldade de encontrar computador programado para o nosso idioma, por motivos que não consigo entender. Conclusão, não recebi nem enviei. Tenho falado por telefone com minha filha. Graças a Deus ate aqui tudo em ordem, dentro do previsto, e tudo muito alem das expectativas.

Em Yokohamo, até 11-08, fui levada para o futuro da humanidade, Em Ayabe: Kameoka da Igreja Oomoto, fui levada para o Céu, por cinco dias, com direito a desfrutar de uma grande área verde, conhecer templos oomotanos maravilhosos, participar de cerimônias, diversas inclusive do chá, conhecer muito sobre a cultura tradicional japonesa, participar de meditação, cerimônia especial, onde cada um de nós recebemos um kimono para usar e levar como lembrança também passeios, etc, etc, etc. Sem rádio, televisão, jornal, celular e tudo o mais que lembre que existe um mundo aqui fora.

Bem, então no final do dia 15, tive que acordar do sonho, voltar para o nosso mundo real, e fui para a Cidade de Kyoto, conhecendo agora o verdadeiro Japão, com seus usos costumes, tradições, etc, etc,. Já visitei Hirochima, Ozaka, Suzuka, e ficarei nessa região até o dia 24-08. Já visitei diversos patrimônios da humanidade. Seguirei então para Tóquio, onde ficarei até o dia 29-08, e então espero escrever mais.

Todos os dias agradeço a Deus por esta oportunidade. É uma experiência que não tenho palavras para qualificar. Estou aproveitando



muito, estou bem de saúde graças a Deus e já com saudade de todos.

Tudo de bom para todos, um grande abraço. Lembro a todos que essa verdadeira aventura, só me é possível através do ESPERANTO.

China

Em primeiro lugar, desejo que todos estejam passando bem de saúde. Tenho acompanhado dentro do possível pela internet, as notícias de nosso país. Ah como gostaríamos que fossem melhores, mas enfim é o nosso país.

Tenho mantido contato telefônico regular com minha filha e familiares, e Graças a Deus, está tudo bem.

Tenho notícias de alguns amigos, não tão bem de saúde, mas estou sempre vibrando muito por eles, pela melhora e pela recuperação.

E então desde o dia 29/08, estou na cidade de Nanchang/China, na casa de uma amiga. Tenho saído, passeado bastante, mas aqui é uma pausa na viagem e uma experiência de conviver com os chineses.

Desde que eu cheguei, em casa, minha amiga aboliu aquela pimenta vermelha de uso rotineiro. Agora, ela é servida, separada na mesa para quem quiser se servir, e acreditem eles comem, como se fosse um musse.

Acontece que temos saído bastante e até ido almoçar, jantar, em restaurantes típicos chineses (que redundância), e como é o costume, tudo tem muita pimenta. Eu fico separando os vermelhinhos, mas não adianta, o tempero é com pimenta. E o meu estômago já começa a reclamar. Eu realmente não posso com pimenta.

Mas também tem muito por aqui, pão, queijo de soja, iogurte com frutas, frutas em geral, inclusive a melancia que eu gosto muito.

Já fui ao comercio mais para olhar, do que para comprar. No Brasil, temos a fama, que o sinônimo de mercadoria chinesa, é mercadoria barata. Aqui não é bem assim. Roupas chinesas boas, são caras. Uma blusa de seda chinesa, custa caríssimo. Porcelana chinesa, custa caríssimo MP3, MP4, de marca, tipo Sony, custa caro. Mas imaginem uma rua vinte e cinco de março, bem maior, e imaginem esta rua aqui na própria China. É coisa para povão mesmo. E povão é o que não falta aqui. Nesta cidade, soube que moram 3.000.000 de habitantes. Mas é tanta coisa, tanta coisa, e aí sim os preços são baratos, mas também a qualidade é dos mesmos produtos chineses que encontramos no Brasil.

Nanchang, é uma cidade grande, com grandes avenidas, e avenidas muito largas. O trânsito não lembra em nada o vizinho Japão. Aqui, é uma confusão, 70 por cento do movimento é de motos e bicicletas, que andam livres em meios aos carros, ônibus, caminhões, etc, etc.

Me disseram que esta cidade, é a cidade que mais água tem na China. Tem grande rio que corta a cidade, e tem grandes lagos. Minha amiga mora às margens de um lago, que para contorná-lo, precisa andar por quatro horas. Todo este contorno é arborizado, e muito bonito e agradável. À noite, o efeito das luzes na água, é muito bonito.

Visitei o que chamam de uma parte mais nova da cidade, e aí é que dá para entender, quando se ouve dizer, que a China vive um momento de grande desenvolvimento. São tantos, tantos prédios, muito, muito altos, em construção, que a impressão que dá, é que eles estão construindo mais um apartamento para cada morador, e então me disseram que tudo isso não é suficiente para atender todas as pessoas que querem comprar apartamento, e com isso o preço dos imóveis é muito alto.

Uma semana antes de mim, minha amiga hospedou um esperantista americano, que também participou do Congresso, no Japão. Ele disse para minha amiga, que agora começa a entender porque os americanos estão com medo dos chineses, e o mundo que se cuide, porque a China, está mesmo em franco desenvolvimento.

Aqui tudo é milenar. Quarta feira, dia 5/09, fomos visitar um vilarejo, que fica a 60 km. daqui, é patrimônio histórico, e é famoso, porque parou no tempo e no espaço. Tudo lá é como há mais ou menos uns quatrocentos anos atrás, as casas são enormes, os donos moram lá, mas permitem que se entre para conhecer, as casas são enormes, enormes, e cada um conta a história de sua família, que viveram na mesma casa, e eles se orgulham disso, de viverem ainda no mesmo local onde viveram os antepassados. É como se visitasse um museu, com a diferença que os donos estão lá. Nós almoçamos em uma dessas casas. Fomos à cozinha, escolher o que queríamos comer, inclusive o peixe, que podia ser escolhido, entre os vivos, pescados naquele dia, e que estavam dentro de uma lata de 20 litros, com água.

Neste vilarejo tem uma árvore, muito grande com uma placa, indicando que ela foi plantada há mil anos. A placa está lá e eu fotografei.

Bem daqui, no dia 10/09, sigo para a cidade de Wuhan, onde esperantistas já me



aguardam, 3,30 horas de trem. No dia 14, com eles, sigo para a cidade Rizhao, será um dia inteiro de viagem de trem, participaremos lá, do que comparando com o Brasil, seria o Congresso de Esperanto do Estado de São Paulo, aqui, é um congresso daquela região. Já me inscreveram nesse congresso, e já estou sabendo que todos receberemos uma roupa especial de participação. O congresso será nos dias 15/16 e 17/09. No dia 18/09, com outros esperantistas sigo para a cidade de XIAN.

É uma cidade histórica e milenar. Me disseram o seguinte: Se estivermos na China sem muito tempo, e tivermos que escolher entre conhecer Pequim e Xian, devemos pelo valor histórico conhecer Xian. Graças a Deus, eu não precisarei escolher, terei oportunidade de conhecer as duas. Para chegar lá, também será uma viagem de trem de dia inteiro. Aqui tudo é muito longe. Ficarei lá dias 19/20/21 e 22/09. No dia 23, mais um dia inteiro de viagem, e chegarei a Pequim. Ficarei hospedada num hotel, próximo da Liga Chinesa de Esperanto, com acompanhamento e orientação de esperantistas.

Na China, eu pessoalmente, vim para visitar a minha amiga. Graças a ela, e alguns esperantistas, terei essas oportunidades de viagem interessantes, e graças a Deus, continua dando tudo certo. Já me falaram tanto, tanto do que tem para conhecer em Pequim, que é claro terei que selecionar os mais interessantes.

Se Deus quiser, dia 30/09, volto para o Brasil. Saindo daqui, não sei como será a comunicação, se terei facilidade de usar internet. Se for possível, escreverei.

Um abraço com saudades, a todos.

Aparecida



**Luiz Vaz de
Camões**
(1524 - 1580)

ALMA MINHA GENTIL

originalo de Luiz de Camões
(siavice adaptita el Petrarca)

Alma minha gentil, que te partiste
tão cedo desta vida descontente,
repousa lá no céu eternamente
e viva eu, cá na terra, sempre triste.

Se lá no assento etéreo, onde subiste,
memória desta vida se consente,
não te esqueças daquele amor ardente
que já nos olhos meus tão puro viste.

E, se vires que pode merecer-te
alguma coisa a dor, que me ficou
da mágoa, sem remédio, de perder-te,

roga a Deus, que teus anos encurtou,
que tão cedo de cá me leve a ver-te,
quão cedo de meus olhos te levou.

A tradução deste soneto para em
Esperanto encontra-se na pág. 8

LAMPIRO

Raportu pri via loka esperanta agado rekte al
lalampiro@easp.org.br



VINO VEKAS VERON

(“In vino veritas”)



Floriano Pessoa
Rio de Janeiro/RJ

1. ENKONDUKO

“Kiu bone drinkas, bone dormas; kiu bone dormas, tiu ne pekas; kiu ne pekas, iros en la ĉielon; sekve, kiu bone drinkas, iros en la ĉielon”.

La supra rezono, kredeble farita de iu bonhumora monaĥo, apartenas al la riĉa kolekto de sentencoj, aforismoj, proverboj kaj ĉiaspecaj diroj pri VINO, unu el la plej uzataj trinkaĵoj en la historio de la homaro.

La titolo mem de ĉi tiu prelego estas aforismo asertanta, ke, se homo trinkas vinon, li emas pli libere kaj sincere paroli, do ellasi la veron, kiun li ordinare kaŝus.

En la Psalmaro (104,15) troviĝas la malnova konstato: “la vino gajigas la koron de la homo”. Kaj en la Proverbaro, interalie, la ironia “akvon prediki kaj vinon trinki”, kaj tiu sintezo de la vivo-plezuroj: ”vino, virino, tamburino”.

Vino estas farata per fermentado de la suko de vinberoj (*vitis vinifera*), en speciale kontrolataj kondiĉoj.

2. HISTORIO

Vinberoj estis kultivataj en la meza oriento jam ĉirkaŭ la jaro 4000 a.K.

Pluraj mencioj en la Biblio indikas la fruan originon kaj la gravecon de la vino-industrio en tiu regiono. La antikvaj grekoj tenis viglan komercon de vinberoj kaj plantis ilin en siaj kolonioj, de la Nigra Maro ĝis Hispanio. La romanoj dissemis vinberojn en la valoj de

riveroj kiuj fluas tra la hodiaŭ plej konataj produktantaj regionoj de Francio.

La uzado de vino en la kristana meso helpis ĝian industrion, velkintan pro la disfalo de la Romia Imperio, kaj iuj religiaj societoj konservis kaj disvolvis plurajn el la alte taksataj produktantaj regionoj en Eŭropo.

La vito-kultivado estis enkondukita en Amerikon per la vojaĝoj de Kristoforo Kolumbo.

Martim Afonso de Souza portis en Brazilon la unuajn vinberojn en 1532, sed nur post la alveno de germanaj kaj italaj enmigrintoj en Rio Grande do Sul, la brazila vino-industrio efektive progresis.

Inter la jaroj 1870 kaj 1900 la vino-industrio preskaŭ bankrotis pro la disvastiĝo de la insekto “phylloxera”, veninta el Usono.

3. KIEL ONI FARAS VINON

Ĝis la esploroj de Pasteur, en la XIXa jarcento, oni ne sciis, ke la vino naskiĝas el fermentado de la vinbersuko fare de gistoj (portugale: leveduras), kaj ke speciala zorgo estas necesa por eviti infektadon de la fermentanta maso per nedezirataj mikro-organismoj, ĉefe bakterioj. Por eviti tian infektadon, la vino estas varmigata ĝis iu difinita temperaturo, laŭ procedo nomata “pasteurizado”, aŭ kontaktas sulfuran dioksidon. Kaj, en la XXa jarcento, la uzado de fermentujoj kaj aliaj ujoj el neoksidebla talo, ebligis pli bonan purigadon, pli akuratan kontrolon de temperaturo, kaj sekve pli bonan kvaliton de la produkto.

Ekzistas pli ol 5000 variaĵoj de “vitis vinifera”- la vinbero deveninta el la montoj de Kaŭkazo, uzata por vinproduktado. Ĝi taŭgas por tiu celo, kiam la suker-enhavo



estas sufiĉe alta por naski vinon kun almenaŭ 10 procentoj da alkoholo, kaj la acideco estas ne pli alta ol 1% da tartrata acido. Tiaj vinberoj plie prezentas mirindan diversecon de koloroj, odoroj kaj gustoj.

La plej bonaj lokoj por kultivado de vinberoj troviĝas en la mildaj zonoj, sen temperaturaj ekstremoj, je latitudo inter 30 kaj 45 gradoj norde, kaj inter 30 kaj 45 gradoj sude de la Ekvatoro.

Dum la vivo-ciklo, printempe komenciĝanta, la beroj ja bezonas certan minimumon da suna varmo, je temperaturo pli alta ol 10 gradoj, por atingi la suker-nivelon necesan al farado de la vino, kaj teni la acidecon en la dezirata limo.

La plej famaj vino-regionoj en Francio estas: Bordeaux, Bourgogne, Rhône, Champagne, Alsace kaj Loire.

En Bordeaux oni faras ruĝan vinon el cabernet sauvignon, cabernet franc kaj merlot; blankan el sauvignon blanc kaj semillon. En Bourgogne, ruĝajn el pinot noir kaj gamay, blanka el chablis. La blankaj vinoj el Alsace venas precipe el vinberoj riesling, gewürtztraminer kaj pinot gris. La fama ŝaŭmvino champagne estas farata el chardonnay kaj pinot noir. La jena bildo montras simpligitan skemon de vino-fabrikado.

Aliaj landoj kun longa tradicio de vinfabrikado estas: Italio, Germanio, Hispanio, Portugalio kaj pli moderne Usono, Aŭstralio, Suda Afriko kaj Suda Ameriko (Ĉilio, Argentino, Urugvajo kaj Brazilo).

4. VINO: TIPOJ, KONSERVADO KAJ UZADO

Tipoj de vino: ruĝa, blanka, roza, ŝaŭ ma, "fortigita". Krome, el Portugalio venas aparta tipo: la nematura vino, el nematuraj vinberoj, kun pli alta acideco.

Ruĝaj vinoj devenas de vinberoj ruĝaj; la blankaj, el vinberoj blankaj kaj ankaŭ el ruĝaj, kiam ties ŝeloj ne restas en kontakto kun la fermentonta maso. Por fari rozajn vinojn

oni dum kelka tempo lasas la ŝelojn de ruĝaj vinberoj en kontakto kun la mosto. Ŝaŭmvinoj havas altan enhavon de karbona dioksido, devenanta jen de enbotela fermentado, jen de CO₂-aldono en ujoj sub alta premo.

Vinoj speciale taŭgaj por deserto ricevas aldonon de vina brando, kiu altigas la alkoholan procenton, haltigas la fermentadon kaj tenas alta la suker-enhavon. Tiaj estas la vinoj Porto (Portugalio), Jerez (Hispanio) kaj Marsala (Italio), kies alkoholo situas ĉirkaŭ 20 procentoj. Al tiu sama klaso apartenas la vermutoj, nome vinoj al kiuj oni aldonas aromriĉajn herbojn kaj spicojn kiel oranĝa ŝelo, cinamo, safrano, kariofilo, koriandro kaj similaj.

La konservado kaj transportado de vino en vitraj boteloj kun korko-ŝtopilo estas relative nova (XVIIa jarcento). Oni antaŭe uzadis argilajn potojn kaj sakojn el kruda led, kies gusto kaj odoro damaĝis la vinon.

Vinon oni devas konservi en bareloj kaj boteloj gardataj en keloj, ofte subteraj, je temperaturo inter 12 kaj 17 gradoj. La kelo devas esti preskaŭ senluma kaj permesi iom da aerumado. La humideco ankaŭ estas kontrolata.

Informoj sur vinbotelo: produktanta regiono, devena vinbero, tipo de la vino (ruĝa, blanka, dolĉa, seka), rikolto-jaro, alkohola enhavo. En Francio kaj en aliaj landoj, la plej altkvalitaj vinoj portas la indikon "kontrolata nomo de origino", (france: "appellation d'origine contrôlée").

Tre grava por la vino-konservado estas la botela ŝtopilo. Tiu nepre devas permesi "spiradon" de la vino, tio estas, iom da enirado de aero kaj elirado de vinvaporoj. Tiun kondiĉon por taŭga maturiĝo de la vino oni plenumas per uzado de korkaj ŝtopiloj.

Iuj ruĝaj vinoj postulas servadon je la manĝoĉambra temperaturo. Ĉar la kelo ordinare estas pli malvarma, tiuj vinoj devas, antaŭ servado, ripozi en la ĉambro, por atingi ties temperaturon. La francoj nomas tion "chambrier" ("alĉambriĝi") la vinon.

(Daŭrigas sekvapaĝe)



Jen proksimumaj valoroj de temperaturo por servado de vinoj:

Blankaj kaj rozaj vinoj — 6 ĝis 8 gradoj

Ruĝaj — 14 ĝis 18 gradoj

Ĉampano — 5 ĝis 7 gradoj

Porto — servi pli malvarma ol la manĝo-cambro

Oni prefere evitu la uzon de fridujo sed metu la botelon en rektan kontakton kun dispecigita glacio.

Ne estas vero ke “ju pli maljuna, des pli bona vino”. Jen proksimume la periodoj konsilindaj por konsumado de la vinoj:

Blankaj — 1 ĝis 4 jaroj

Ruĝaj leĝeraj — 2 ĝis 6 jaroj

Densaj vinoj de Bordeaux — 4 ĝis 20 jaroj

Akordiĝo inter manĝoj kaj vinoj

Fiŝoj kaj marproduktoj	<i>blanka vino</i>
Omaro	<i>ruĝa aŭ roza</i>
Fungo- kaj trufo-omleto	<i>ruĝa</i>
Rostita meleagro	<i>ruĝa</i>
Bova viando	<i>ruĝa</i>
Ĉasaĵo	<i>ruĝa</i>
Legomoj	<i>ruĝa</i>
Deserto	<i>dolĉaj vinoj kaj ŝaŭmvinoj</i>
Fruktoj	<i>porto (blanka, seka)</i>



Por salatoj faritaj kun vinagro oni ne devas uzi vinon.

“La vino havas la povon plenigi la animon per la tuta vero, la tuta saĝo kaj filozofio”.

(Bossuet)

Bibliografio:

1. *Britannica 2006/*

2. *Dumay. R. “Guide du vin”*



R\$ 36,00

Brazila Esperanta Parnaso

La plej ampleksa antologio de brazilaj poetoj, organizita de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rêgo

formato: 16x23cm

272 p. + 17 koloraj

kudre bindita

Mendebla ĉe la libroservo de EASP

Aplikado de Esperanto en Religioj kaj Filozofioj

Prelego farita en Rio de Janeiro okaze de la 42-a BKE kaj 27a BEJK

Vicente P. Werneck
Volta Redonda/RJ

MOTIVIĜO = TEORIO AŬ PRAKTIKO? KIU PLI GRAVAS?

TEORIO: kiam oni ĉion scias, sed nenio funkcias.

PRAKTIKO: kiam ĉio funkcias, sed neniu scias kial.

Disvastigado de la I.L.Esperanto (E-o)

Ĝenerale, oni interkonsentas, ke ju pli oni aplik(ad)as Esperanton al la pluraj homaj aktivecoj, nome al industriaj, komercaj, turismaj, religiaj, filozofiaj, sciencaj, ekologiaj kaj artaj aferoj, des pli bone por ke oni atingu efikan disvastigadon kaj popularigon de E-o.

Por tiaj praktikaj celoj, E-o estis lerte elpensita de Zamenhof, tiucele ĝi ekzistas kaj laŭ samideanara aprezado, ĝi bonege funkcias! Jen taŭga vojo al la t.n. “fina venko”!

Do, nepre necesas ke oni ne nur informu pri E-o al la ekstera publiko kaj ĝin instruu plurnivele, sed ankaŭ ĝin apliku en la diversaj homaj fak-aktivecoj.

Estiĝas tiumaniere (kvazaŭ) simbiozaj interrilatoj inter E-o kaj homaj fakoj kun ambaŭ-flankaj profitoj, ŝajne jam de multaj konstatitaj en praktiko antaŭlonge.

Tutnature, ĉiu homa fako havas sian propran valoron kaj utilecon, do oni sugestas, ke al ĉiuj/ĉiaj ajn homaj fakoj estu aplikata E-o. Ekzemple, oni elektu ĉi-taske, pro kelkaj kialoj, direkti nian atenton al aplikado de E-o al la t.n. religiaj kaj filozofiaj aferoj.

Bonŝance, kiel de multaj sciato, nuntempe pluraj religioj kaj filozofioj jam fakte aplikadas E-on kiel disvastigilon de siaj respektivaj teorioj/instruoj/interpretoj. Jam ja E-iĝis La Sankta Biblio, La Nobla Korano, verkaro

pri Spiritismo, verkaĵoj pri Kosmologio, pri Logozofio, pri la Kredo Bahaa, pri Rozakruco, pri Oomoto, pri Mormonoj. Aldone, oni scias ke nuntempe ekeblas aplikado de E-o en la sino de la Katolika Eklezio kiel efiko de juŝa verkaĵo titolita p.l. “Esperanto, o novo Latim da Igreja e do Ecumenismo” de Ulrich Matthias (el Germanio). Ankaŭ Legio de Bona Volo (LBV) agadas E-e por unuiĝo de ĉiuj religioj.

Ĉar tro vastas tiaj aferoj, oni proponas ilin ekzameni laŭ ĝiaj ĝeneralaj aspektoj, nome ĝiaj teoriaj principoj kaj distingiloj, cele al pli/eĉ plej bona aprezado de ĝiaj valoroj/utilecoj laŭmezuro de ĝiaj praktikaj rezultoj.

Ne estas nia celo/intenco ĉitie ofendi/defendi tian aŭ kian ajn religion aŭ filozofion, ĉar E-o-movado, oni/ĉiuj scias estas neŭtrala movado, do oni ne prozelitismas en E-a medio, ĉu ne?

Kaj, por bone aprezi tiajn aplikadojn de E-o, oni simple ekzameni:

- Kial ni elektis religiajn/filozofiajn aferojn?

- Kiel religioj kaj filozofioj respektive identiĝas?

Afero-elekto

Kiel oni/ni ĉiuj sufiĉege scias per televida novaĵaro kaj gazetaro, la aferoj pri la homa vivado/kunvivado NE BONE marŝas nuntempe en la tutamondo!

Tro da militoj en pluraj landoj (eĉ en Brazilo) koruptado, malriĉeco, malsanoj kaj katastrofoj. La planedo grave supervarmiĝas kaj por tion alfronti la ekologiistoj lerte kaj senlace laboras.

Ja senutilas, tute vanas tion nei!

Tial, celante solvi tiajn viv-situaciojn por ĉiuj ĝenerale, revante pri ankoraŭ neatinglebla kaj malfacila paco, la personoj emas amase serĉi/alproksimiĝi al la t.n. religioj aŭ filozofioj, krom ankaŭ al sciencaĵoj.

Tutnature, ni ĉiuj ege soifas por saĝeco!

Ni ĉiuj ege scivolas pri taŭgaj solvoj por la misteroj kaj doloroj nin atingantaj, mallongvorte, solvoj por la problemoj de la vivo!

(Kiel diras Dario, la futbalisto: “Al ĉiu problemaro, respondas iu solvaro.” – p.l.: “A cada problemática, corresponde una soluciónática.”)

Ĉiuepoke kaj ĉiuloke (ek)aperis/adas diversgradaj religiuloj kaj filozofoj, kiuj saĝe kaj kuraĝe kontribu is/ade kontribuas, ĝiu siamaniere, se ne solvi almenaŭ mildigi la defiantajn malfacilaĵojn de l’vivo. La Religioj kaj Filozofioj de ili iniciataj, ŝajnas al ni, valoras la penon eklerni kaj plej eble ilin iom (aŭ el-) scii, cele al nia propra konveneco.

Identigiloj de Religioj kaj Filozofioj

Religioj kaj Filozofioj verŝajne tutmalsamas.


Laŭhistorie, jen homaj aktivecoj kiuj devenas el malsamaj, eĉ kontraŭaj sintenoj de eble pratempaj homaj grupoj antaŭ la misteroj kaj doloraĵoj de l’vivo, nome:

- Kelkaj ekimadis ekzistadon de nevideblaj potencoj/uloj, la t.n. “dioj”, efikaj kaŭzantoj de la naturaj fenomenoj: fulmoj, tondroj, pluvegoj, tertremoj, martremoj (“cunamo”), vulkanaj fajraĵoj, ktp...

Do, kvietigi la koleron de l’dioj kaj ilin kontentigi iĝis nepre necese, el kio estiĝis la t.n. “latrioj” (= adoroj) kaj ĝiaj anoj, la “latrianoj” (= adorantoj), nuntempe konataj kiel “religioj”/“religiuloj”, karakterizitaj per ĝia/ilia dogma mensaco (eklezioj).

Laŭ lingva aspekto, rimarkindas ke, dum la antikveco (A.K-a epoko), la latina vorto “religio” ne ekzistis laŭ la nuntempa senco, t.e., adorado al dio/dioj. Nur post

jaro 330 p.K. ĝi ekprenis tian signifon, do ekde la oficialigo de Kristanismo sub regado de Konstantino en la Roma Imperio. Adorado je Dio estas do moderna signifo de la vorto “religio”. A.K-e ekzistis nur la “latrioj”. Paroli pri “religio/j” dum A.K-a epoko estas gramatika anakronismo, t.e., vorto ekster sia tempo.



- Aliaj emis al serĉado de “sofio” (= saĝo, scio). Tial, ili ekis “filozofii” kaj iĝis konataj kiel “filozofoj”, tiuj kiuj rezone serĉas la veron en la naturaj fenomenoj, oni emfazis simple per intelekta/rezona agado.

Ĝustatempe, oni mallonge memoru pri filozofiaĵo de Buda, kiu instruis 500 j. a.K. jene:

“(Vi) Kredu nenion, nur se ĝi estas skribita en sanktaj libroj.

Kredu nenion, nur se ĝi estis dirita de saĝulo.

Kredu nur, kiam la skribita doktrino aŭ diraĵo konformas al via propra rezonado kaj konscio”.

Kelkaj Konstatoj

Interrilatoj:

Konstateblas ke, pro simileco de sinteno, la nuntempa sciencaro klare devenas el la aktivecoj de la unuaj filozofoj. Do normale, filozofioj estigas sciencojn. Ekze, la nuntempa “Fiziko” estis iam nomata “Natura Filozofio”.

Tamem kurioze, se temas pri Spiritismo, oni scias ke la kontraŭo okazis, t.e. spirita scienco unue aperis kaj poste ĝi fariĝis je “spiritualisma filozofio” (laŭ “La Libro de la Spiritoj”, de Allan Kardec).

Pri materiismo:

Laŭ kiu la nura realaĵo estas/us la “materio”.

(Daŭrigas sekvapaĝe)

Nuntempe, post la atingoj de Fiziko, “materiismo” aliĝas je “energiismo”.

Pri identiĝo de Spiritualismo:

Oni rimarku, ke Rozakruco kaj Kosmologio rifuzas nomiĝi ia “religio”. Ili publike sin memprezantas kiel estante ĉiu siamaniere ia “spiritita scienco”.

Pri dogmatismo:

Kiel sciante, “dogmoj” estas ekleziaj nediskuteblaj “veraĵoj”, do neŝangeblaj. Tamem, oni rezonadu: Se “politeismo” malrapide aliĝis je “monoteismo”, konstateblas ke ankaŭ latrioj/religioj emas al evoluado, des pli bone!

Pri identiĝo de Spiritismo:

Oni diras ofte en Brazilo ke “Spiritismo estas/us ia religio”.

Tamen, ĉar “religioj” kaj “filozofioj” ŝajnas nekongruaj, ni/oni proponas/u ke Spiritismo identiĝu kiel “filozofio”, same kiel volis ĝia iniciatinto Allan Kardec mem. Religioj kaj Spiritismo estas simple branĉoj de la t.n. pli ampleksa fako “SPIRITUALISMO”.

Permesu analogiojn:

Aserti ke “Spiritismo estas religio” similas aserti ke, ĉar kato kaj hundo estante ambaŭ bestoj, ke “kato egalas je hundo”. Do, la brazila Spiritismo-movado serĉas “katon” kiu bojas kaj “hundon” kiu miaŭas!

Simile, pomo kaj piro kvankam fruktoj, ili malsamas unu la alian, ktp ...

Pri Inri Cristo (diru Kristo):

De antaŭ kelka tempo, oni vidas per televido personon kiu nomiĝas Inri Cristo (diru Kristo), kiu sin prezentas kiel Jesuo Kristo revenanta. Li estas barba kaj vestiĝas per ruĝa mantelo sur blanka robo, kvazaŭ je orientpopola maniero. Sur lia kapo kuŝas duondornita krono, kiel ekstera signo de lia reĝeca rango. Liaj filozofiaĵoj/instruoj

disponeblas pere de la tutmonda komputila reto, nome: www.inricristo.org.br

Li publike ekaperis en 1982 (februaro 28-an) en Belém do Pará, kiam li realigis la t.n.-n “Liberigan Agon” kaj fondis SOUST (p.l. Suprema Ordem Universal da Santíssima Trindade). Nune, li loĝas en Brasilia/DF.

Demandite ĉu li estas/us frenezulo, li respondis:

- “Jes, mi estas frenezulo, mi frenezas pro amo al Homaro”!

Ni (el VR E-Klubo) lin invitis por E-igi liajn filozofiaĵojn. Inri Cristo (diru Kristo) interkonsentis kun ni, do jen ni gajnas unu plian E-Samideanon!

Dankon al ĉiuj!



Bibliografio

- LA SANKTA BIBLIO. Bibliaj Societoj de Londono kaj Edinburgo, 1988. 996p.
- LA NOBLA KORANO. Kopenhago, Torben Kehlet, 1969. 664p.
- LA LIBRO DE LA SPIRITOJ. Allan Kardec, FEB 1989, 479p.
- O LAÇO E O CULTO – É o Espiritismo uma religião? (p.l.) de Krishnamurti de Carvalho Dias, DICESP 1985, 160p.
- Spiritualismaj revuoj pri Rozakruco (AMORC). Brazilo.
- A SAGA DOS CAPELINOS – Volume 6: Jesus, o Divino Discípulo, Os Anos Desconhecidos, Albert Paul Dahoui, Heresis 2005, 304p.
- Spiritualismaj revuoj pri Kosmologio, Martinus, Martinus-Instituto, Danmark.
- Filozofia revuoj “SIMPOZIO” Kultura Fondaĵo Simpozio, Majo 2006, 45p.
- Esperanto, O Novo Latim da Igreja e do Ecumenismo (p.l.) Ulrich Matthias, Pontes 2003, 107p.
- Filozofiaĵoj de Inri Cristo: “La Liberiga Ago”, SOUST, Belém (PA), 1982. 26p.
- Templo de Bona Volo (LBV), Braziljo/DF – Brazilo (flugfolio).
- Almanako Lorenz, F. Lorenz, 2007. Brazilo. 120p.
- “Oomoto”, Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA). Japanio.
- LOGOZOFIO. Carlos Bernardo Gonzalez Pecotche, Logozofia Fondaĵo. Brazilo, 1969. 04p.
- Enkonduko al Logozofio. Célio Freitas Martins. INKO, Julio-Aŭgusto, 2005, KKE (prelego). 05p.
- La KREDO DE BAHÁ U'LLÁH. Mond-Religio. Shoghi Effendi. World Order Magazine. vol.XIIIa, n-ro.7, Oktobro, 1947 (USONO). 04p.
- Por-Esperanta Mormonaro (PEM). Faka Asocio, Kolombio, fond. 1980.

Unua libro verkita en Esperanto en Brazilo 70-jariĝas

Fabiano Henrique
Niterói/RJ

La unua libro originale verkita en esperanto en Brazilo fariĝas 70-jara. Temas pri Veterano, kies aŭtoro estas Iŝmael Gomes Braga.

La libro pritraktas la esperantistan travivaĵon de unu el la plej elstaraj aktivuloj de la Esperanto-movado ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en la tuta mondo, dum la unua duono de la 20-a jarcento.

La motivo de tiu verko estis demandaro disdonita okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto, en la jaro 1937. Ĝi temis pri la spertoj de kelkaj gravaj samideanoj tiam taksataj maturaĝaj.

Kvankam Iŝmael Gomes Braga ne ŝatis esti konsiderata maljunulo, li konsentis respondi la demandojn. En la antaŭparolo li eĉ diras: “Veterano mi?!... Eksigita soldato aŭ emerita oficiro?!... Sed mi estas juna kaj brava batalanto!” Lia nura postulo koncernis al tio, ke oni rigardu lin kiel “junulon de pli da tempo” ol la alia.

Poste, la plenigita demandaro ebligis la eldonon de verko, kiu ja estas tre valora historia dokumento, plena je gravaj faktoj kaj konsiloj por la venontaj generacioj. “Mi koleris, sed ne povis diskuti, ĉar ni estis antaŭ mikrofono...” – konkludis Iŝmael G. Braga, sprite vidigante rezignacion.



La unua eldono, farita de Eldonejo Gazeto de Ameriko fine de 1937, rapide elĉerpiĝis. Kelke da favoraj recenzoj aperis en esperantistaj periodaĵoj. Tiu tute ne antaŭvidita situacio mirigis la aŭtoron kaj atestis la sukceson de la libro.

La teksto estis skribita en stilo simpla, flua kaj speciale gajhumora. Plenigas la libron kolekto da artikoloj el pluraj epokoj, ĉiuj riĉaj je saĝeco kaj sobereco. Tiuj kvalitoj – kaj aliaj trovotaj de la legantoj – faras el Veterano verkon nepre legindan de ĉiu civilema esperantisto.

Ancoraŭ ekzistas multaj ekzempleroj de la dua eldono, publikigita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en 1965. Veterano estas mendebla per la hejmpaĝo www.kke.org.br; per poŝto oni povas ĝin aĉeti skribante al la jena adreso:

Cooperativa Cultural dos Esperantistas
Avenida Treze de Maio, 47 –
sobreloja 208 Centro
CEP: 20031-921 Rio de Janeiro



1-a BEL- Konferenco en la urbo Lorena/SP

3 - 4 de februaro 2008

Informiĝu ĉe psviana@terra.com.br

LA VIVO ĈIRKAŬE

Inspiras min la vivo en ĉirkaŭo:
stratoj, floroj, birdetoj, homoj, bestoj,
fotoj, muziko, simpla adiaŭo,
momenta frazo, ĝojo dum la festoj...

Ĉio valoras, gravas al poetoj,
estas la vivo mem ia trezoro,
ĉefe bonegaj verkoj sur la bretoj,
arbaroj, oceanoj kaj... l' amoro;

La mono en la banko, tiu benko
sur la placo aŭ bela trotuaro,
eventualaj perdoj, tamen venko
pri kio mi plu dankas ĉe altaro.

Ĉiutage mi preĝas je mateno
kaj mi dankas por nova hodiaŭo,
ĉar mi estas libera de katenoj:
inspiras min la vivo en ĉirkaŭo!



Jorge das Neves
(*Georgo das Neves*)
Rio de Janiero/RJ

**Manoel Borges
dos Santos**
(*Dokito*)
Muritiba-BA




VIKTIMO DE LA AMO

Altiras min la Amo senkompatate
Kaj tenas min en sia forta reto...
Mi volas liberiĝi vane... Glate,
Profunden pli mi iras, sen rimedo.

Viktimo, mi protestas kontraŭ ĝi,
Perforte ĝi katenas mian vivon...
Kaj kiam aperas mia histori´
Oni indikas ĝin kiel motivon.

Ho, kiel sendanka mia sorto ĉi!
Navigas mi en maro de volupto,
Kaj mi ne estas filo de korupto,
Viktimo de la Amo estas mi!...



Zamenhofa Festo

15/12/2007

En la sideje de
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Rua Faustolo, 124- Lapa
(proksime de SESC-Pompeia)
contato@easp.org.br
(11) 3862-1183

Altnivelaj ĉemizoj je via dispono

Amarílio Hevia de Carvalho
Caixa Postal 246
78600-000 Barra do Garças - MT
Tel. (66) 3401-5203 [21-23h]
amarilio@araguaia.net



Atenton! Bonvole pagi per ĉeko de via
banko aŭ deponi la monon:
Banco do Brasil 9.810-8 / AG. 0571-1

www.araguaia.net/amarilio

BRAZILEI

www.ileibr.org/brazilei



**Porinstrulista revuo
eldonata de Brazila Sekcio de ILEI**

ilei BR
www.ileibe.org